## Pri superjaro kaj -ismo

La jaro 2010 ne estas superjaro laŭsence ke ĝi estus unu tagon pli longa ol normala jaro. Por mi ĝi tamen estas kvazaŭ unujara super-resto kiel ISAE-prezidanto post jardeka aktivado ekde 2000 ĝis 2009 – do iela super-jaro. Mi ofte stumblas super certaj vortkombinoj internacilingvaj kaj meditas, ĉu ili estas ĝuste formitaj, ĉu uzi ilin en sciencrevuaj tekstoj. Nia asocia organo ja omaĝis en SR 4/2009 la Darvinan 200-an naskiĝdatrevenon. Okaze de tio mi stumblis sur "darvinismo". Terminoj kun la sufikso -ismo ĝenerale karakterizas konvinkon aŭ valoratribuon. Ili estas persono- aŭ ideologi-ligitaj. Marksismo, kristanismo, ateismo. Ĉe la darvina teorio temas pri priskribo de objektiva cirkonstanco. La diferencigo ne celas al valorprijuĝo sed al disdivido de diversaj pens-kategorioj. Ni ja ne parolas pri kopernikismo kiam ni parolas pri la moderna astronomio aŭ pri keplerismo dum planedaj rivoluoj. La -ismoj havas kredantajn anojn. Ĉu Darvino por siaj ekkonoj bezonas "anojn", kiujn ne bezonas Koperniko, Keplero aŭ Ejnŝtejno? Ĉu oni bezonas la darvinan "-ismon" por dedukti sociajn sekvojn el naturscienca teorio, interhomajn firilatojn pro facilanima interpretado de "batalo por transvivado de la plej taŭga, de la plej forta ulo"?

Reen al la ĉiujn jarkvarojn revenanta superjaro, kiu nomiĝas en la germana lingvo "ŝaltjaro" (*Schaltjahr*), ĉar estas en ĝi korektocele alŝenigita aldona tago. La kaŭzo ja estas konata: unu jaro pasas ĝis la Tero unufoje rivoluas ĉirkaŭ la Suno. Por tio ĝi bezonas (preskaŭ) precize 365-kaj-kvaronon da tagoj. Se niaj kalendaroj tamen sin firme ligas al 365 tagoj, tio rezultigos po kvarontaga eraro en unu jaro. Post 4 jaroj multiĝas tiu eraro al 1 tago. Kaj pro tio oni almete aligas la 29-an de februaro. Bedaŭrinde denove enŝteliĝas kaj kaŝe enpenetras plua eraro, ĉar la Tero por ĉirkaŭsuna rivoluo bezonas iomete malpli ol 365¼ da tagoj. En la jaro 1582 tiu eraro sumiĝis al 10 tagoj, kion oni tiel korektis, ke post la 4-a de oktobro senpere sekvis la 15-a de oktobro. Ekde tiam ĉiuj plenaj jarcentoj estas superjaroj, kondiĉe ke ili estas divideblaj per 400.

Tiu ĉi superresta troa nesuperjaro 2010, sen alŝenigita tago, tamen kun aligitaj 12 monatoj da senpaga servo por nia Asocio, malŝaltos mian nun jam dekunujaran ISAE-prezidantecon kaj SR-redaktadon. Karaj aŭtoroj, se vi volas publikigi sciencrevuan artikolon ankoraŭ sub mia superkompostado kaj superzorga lingvaĵa superkontrolo – uzu tiun ĉi super-jaron! *Prof. d-ro Rüdiger Sachs*, ISAE-prezidanto



# Eblas alia eŭropa historio: pri keltoj, kelteco, keltologio

*Dominique* VIEIRA


## Resumo

Tiu ĉi artikolo celas prezenti kelkajn bazajn nociojn pri la kulturo kaj historio de la keltoj kaj interrilatigas ilin al la ekesto de eŭropaj identecoj kaj verkado de eŭropa historio. Tio signifas konsideri, ke keltaj spacoj ekzistas, kaj percepti "keltecon".

En multaj historiaj libroj la keltoj estas karakterizitaj barbaroj, kiuj konturis la ĉirkaŭaĵojn de la grek-romia Imperio. Laŭ tio la keltoj estas gravaj nur por kompreni la ekspansion kaj la kreskadon de la romia Imperio kaj ties luktojn kontraŭ barbaraj invadantoj, kiuj kaŭzis malordon kaj diversajn problemojn ene de la imperiaj landlimoj.

Se oni funde pridemandas kaj kritikas tiujn ĉi antaŭjuĝojn, oni povas krei la eblon verki novan eŭropan historion, kiu konsideras ne nur grek-romiajn trajtojn sed ankaŭ ĝermanajn, keltajn kaj slavajn.

(**Ŝlosilvortoj**: Keltoj, identecoj, Eŭropa historio)

## Enkonduko

Kiam ni malfermas librojn pri la eŭropa historio, antikva aŭ mezepoka, ni trovas preskaŭ ĉiam la samajn figurojn: koloseo, Cicerono, Seneko, Plaŭto, Julio Cezaro, la legendo pri la fratoj Romulo kaj Remo, Kartago kaj la Punikaj Militoj, Eneado, Aŭgusto Cezaro, triumviraro kaj aliaj aferoj, ĝis Romo kaj la okcidentaj provincoj "disfalis" en la jaro 476 p. K.; Egea Maro, Aleksandro la Granda, helenisma periodo, Homero, Ateno, pederastio, pedagogio, filozofio, demokratio, militarto, Sofoklo, Sokrato, Tucidido, Platono, Herodoto, helena mitologio, Panteono ktp; krom tio egiptaj temoj, kiel faraonoj, piramidoj, egipta mitologio, hieroglifoj ktp, kaj mezopotamiaj temoj, kiel ekz. kojnoskribo, sumera lingvo, la epopeo pri Gilgameŝo kaj tiel plu.

Se temas pri mezepoka historio, oni trovos temojn pri la historio de Germanujo, Francujo, Italujo kaj Anglujo, nur lastatempe eblas legi pli precize kaj pli fake pri Hispanujo, Portugalujo kaj Afriko. Krom tiuj ĉi temoj nur se oni serĉas specifajn landajn librojn, kiel ekzemple "La mezepoka Pollando". Ankaŭ la "klasikaj" mezepokaj objektoj estas konataj: la kredo Nicea, feŭdismo, krucmilitoj ĝis Tomaso de Akvino kaj la sĥolastikismo.

La vorto "barbaroj" aperas en niaj libroj nur, kiam oni studas herezajn aferojn, kiel la arianismo de la gotoj, aŭ kiam ili atakis la romian Imperion, kiel faris hunoj, vandaloj kaj la gotoj. Aliaj popoloj aperas nur se ili kreis grandajn imperiojn, kiel ekz. la mongoloj sub Ĝingisĥano, aŭ se ili helpis "konservi" la "klasikan kulturon" kiel faris la irlandanoj[1]. Ili do "eniras" historion, kiam ili helpas – aŭ malhelpas – la "Okcidentan Civilizacion". Jen kiel mezepokaj temoj ofte aperas, precipe en la libroj pri ĝenerala historio.

Tamen, ni rajtas kompreni kaj poste priverki la eŭropan historion alimaniere. Oni ofte resumas ĉi tiujn politikajn problemojn pri la reprezentado kaj kreado de eŭropaj identecoj pere de la fama frazo (trovita en historiaj libroj) por instrui al nigrahaŭtaj kaj mestizaj franclingve parolantaj infanoj en Afriko kaj Ameriko pri iliaj pasintecoj: "*Nos ancêtres les Gaulois* / Niaj prauloj la Gaŭloj".

Tio signifas, ke ankaŭ instruoj pri *Stonehenge*, la neolitika monumento en Anglujo, pri *Vercingetorix*, la ĉefo de la Arvenoj, pri la druidoj, pri Tristano kaj *Isolde*, pri Sankta Patriko kaj la irlandanaj krucoj, pri irlanda mitologio kiel Leprekono (aŭ aliaj keltaj mitologioj) devus aperi en niaj historiaj libroj.

Kial en la lernejo oni devas lerni pri Johanino d'Arko, heroino de Francujo, kaj ne pri Budiko *(Boudicea)*?

Kial oni devas studi Iliadon kaj Odiseadon kaj ne la rakonton *Táin Bo Cuailnge* (esperantlingve: "bovara rabekskurso de *Cooley*"), la ĉefa irlandana epopeo?

Kial pri Aĥilo kaj ne pri *Kuhulano*?

[1] Jen la temo de *Thomas Cahill* (1999) en lia libro, originale verkita angle: "Kiel la irlandanoj savis la civilizacion".



Kial la historio de Eŭropo estas rakontata al ni tiumaniere?

Ĉu antikva historio signifas nur Egipto, Mezopotamio, Romia Imperio kaj la grekoj?

Kial keltoj ĉiam forestas?

Ĉu la keltoj ne partoprenas en la eŭropa historio? Ĉu ankaŭ ili ne gravas?

Ĉu alia eŭropa historio estas ebla?

## Kiuj estas keltoj?

Multaj historiistoj diras, ke ni rajtas nomi la ferepokajn eŭropanojn keltoj (*Kruta*, 1989). Aliuloj kredas, ke oni rajtas paroli pri "keltoj" nur post la grekoj, ĉar la grekoj estis tiuj, kiuj kreis ties nomon (*Powell*, 1965).

Kelkaj asertas, ke oni ne rajtas paroli pri keltoj post la kristana Irlando, aliaj, kiel la folkloristoj, jam kredas, ke eblas studi keltojn kaj la keltecon, eĉ hodiaŭ, pere de la skotaj kaj irlandanaj popolrakontoj, kiujn oni peras "de buŝo al buŝo" kaj kolektas en etaj vilaĝoj[2] de tiuj landoj. La tasko klarigi aŭ elekti, kiu estas kelto – aŭ kion signifas kelteco – certe interrilatas materiajn kulturojn, etnecon, lingvosciojn ktp.

La vorto "keltoj" estas kreita de la grekoj (*keltoi*) por identigi siajn "barbarajn" najbarojn. Poste oni havas *celtae* en la latina, kaj fine keltojn (simile al la greka) en Esperanto. La vorto estis unuafoje uzata en la verko de Hekateo el Mileto kaj post tio ĝi aperas en Herodoto, poste en la verkoj de Tito Livio kaj Polibio kiam ili parolas pri la "kelta ekspansio".

Oni povas trovi menciojn de keltoj en diversaj antikvaj dokumentoj, eĉ la apostolo Paŭlo verkis leteron al la "galatoj". Oni devas konstati, ke keltaj lingvoj estis parolataj ekde la Britaj insuloj ĝis aliaj lokoj tra la tuta Eŭropo, ekz. en la nordo de Italujo kaj Hispanujo.

[2] Kvankam temas pri la fino de la 19-a jarcento, ekzemplo pri tio estas la verkoj de *Joseph Jacobs*. Vd. la titolojn ĉe la Literaturo.

La arĥeologo *Michel Treguer* (2004) diras, ke keltoj estis la unuaj agrikulturistoj en la okcidenta mondo. Laŭ *Waldir Freita Oliveira* (1988), la keltoj multe kontribuis al la ĝermana vivmaniero, ĉar ili instruis la ĝermanojn kiel uzi la feron kiel materialon por fari militajn ilojn, precipe glavojn kaj ŝildojn, la teĥnikan scion por manipuli emajlon, kaj eĉ kelkaj germanaj nomoj (kiel ekz. Maroboldo kaj Ariovisto) estas keltdevenaj.

*Le Roux & Guyonvarc* (1999: 16-32) asertas, ke la keltoj estas inter la popoloj pri kiuj antikvaj verkistoj tre zorgemis. La lingvoj de tiuj ĉi popoloj estas la plej antikvaj kie ili loĝis kaj ne eblas regresi antaŭ iliaj markoj, se temas pri historio de la okcidenta Eŭropo. La keltoj kreis la plejmulton de la urboj, landlimoj kaj regionaj unuoj tiel kiel oni kutimiĝis en la eŭropa historio.

Malgraŭ la malfacilaĵoj, tamen eblas trovi kelkajn similecojn inter la diversaj verkistoj: 1) la vorto "keltoj" aperis unue en grekaj tekstoj; 2) ili kapablis bredi kaj dresi ĉevalojn; 3) ili estas tre gravaj por kompreni certajn eŭropajn devenojn: la keltoj instruis al la eŭropanoj kiel uzi la feron kiel materialon. 4) Oni trovas iliajn markojn sur nomoj de urboj, montoj kaj diversaj lokoj tra la tuta Eŭropo kaj, eĉ hodiaŭ, ankoraŭ ekzistas iliaj postsignoj en multaj landoj kiel Skotlando, Kimrujo, Irlando, Anglujo, Francujo, Bohemujo, Pollando, Hispanujo, Portugalujo, Svedujo, Danujo, Belgujo, Germanujo, Italujo kaj Svislando.

Ekzistas nek "Kelta Imperio" nek "Lando de la keltoj". Eĉ la popoloj, kiujn oni signas "keltoj", estas multaj kaj diversaj. Oni rajtas arigi ilin nur se oni pensas pri proksimeco lingva kaj religia aŭ pri kelkaj similecoj koncerne la socian vivmanieron.

Preskaŭ ĉiuj verkistoj agnoskas, ke paroli pri keltoj signifas paroli pri druidoj, reĝoj, batalantoj, kaj ke ĉiuj keltoj parolis keltajn lingvojn kaj havis arton interesan kaj nekutiman [3]. Oni scias, ekzemple, ke la kelta reĝo estis kvazaŭ klan-ĉefo, kiu estris kelkajn dekojn da familioj de brutar-tenantoj.

[3] Ĉar "kutima" al ni estas la helena kaj la romiana artoj kaj oni devas studi ilin ekde infaneco en niaj lernejoj.



En la antikva kaj mezepoka Irlando ekzistis centoj da tiuj ĉi regnoj, nomitaj irlandlingve *Tuatha* (*Cahil*, 1999: 117). Sankta Patriko, ekzemple, estis sklavo, prizorganta la porkojn kaj ŝafojn de irlandana reĝo nomita *Miliuc*.

Julio Cezaro rakontas en sia fama verko "La Gaŭla Milito" pri multaj keltaj reĝoj, kiel ekz. *Vercingetorix*. Oni ankaŭ bone konas la faman realan/mitologian "Reĝon Arturo".

Se temas pri batalantoj laŭ la grekaj kaj romianaj opinioj, la keltoj estis sendube militistaj popoloj. Al romianoj, dum la epoko de Cezaro, la Gaŭloj estis la maksimuma ekzemplo por barbaroj ĝenerale. *Strabono* (Geografio, IV: 2), ekz., diras ke "La gaŭla raso estas pasiema al milito, tute kolerema kaj preta al bataloj".

*Filippo Oliviere* (2005) rakontas, ke kelkaj temoj estas oftaj pri keltaj batalantoj en la klasikaj verkoj, ĉu en la greka lingvo, ĉu en latina lingvo: aroganteco en la venkoj kaj apatio kiam ili fiaskas, la ĉefo povus eĉ memmortigi sin pro malvenko; militemaj kaj ĉiam pretaj por bierumi kaj ebriiĝi; barbaroj, kiuj mortigis homojn kiel oferdonaĵojn al siaj dioj; al ili estis kutime fortranĉi kaj trofee montri la kapon de malamiko. Laŭ la sama verkisto, la keltoj profunde impresis la romianojn, ĉar ili estis la unua popolo invadinta Romon en la jaro 399 a.K.

La plej fama epopeo de la kelta mitologio rakontas pri la batalanto *Kuhulano;* tiuj ĉi militaj temoj fakte estis gravaj al ili. Kaj se temas pri druidoj, la keltaj sacerdotoj, oni ne povas kompreni la keltan mondon sen ili. Druidoj havis la sacerdotan povon, unuigante pere de religia sistemo diversajn keltajn popolojn ekde la britaj insuloj ĝis la eŭropa kontinento.

Antikvaj kaj mezepokaj dokumentoj ne permesas al ni dubi pri la ekzistado de tiu ĉi sacerdota klaso kaj pri la grava influa rolo de la druidoj en la keltaj socioj. Oni scias, ke eĉ por Romo la druidoj estis danĝeraj, ĉar Tiberio kaj Klaŭdio malpermesis la praktikojn de druidismo (*Donnard Ana*: 2006).

## La keltaj lingvoj

**Insula kelta lingvaro** (gaela kaj britona): irlanda, skotgaela kaj manksa lingvoj; bretona, kimra kaj kornvala lingvoj.

**Kontinenta kelta lingvaro**: gaŭla, iberokelta kaj lepontika lingvoj.

Se temas pri kelta arto, ĝi estas nepriskribebla, elturniĝema, kurblinia, plena de ŝanĝoj pri formoj, miniatura (t.e. kun multaj etaj detaloj), abstrakta, minimumisma, simbola kaj ne-rakontema.

Laŭ *Ruth & Vicent Mesgaw* (ĉe *Green*, 1996: p.345), ĝi estas unu inter la gloroj de la eŭropa pasinteco, tute alia, sed ne malpli grava ol la greka kaj romiana artoj. Tamen, ĝi estis sufiĉe eklipsata de la renesanca arto. La aŭtoroj diras ankaŭ, ke la kelta arto estas ekzemplo de ideo-sistemo kun precizaj motivoj, ofte religiaj, eĉ la ne-reprezentemaj.

Oni legas en la sama verko (paĝo 355), ke la kelta arto estas elemento, kiu ne povas manki por klasifiki keltajn grupojn, ĝi estas materia evidentaĵo al la kredo-sistemo de keltaj homoj kaj la ilo, kiu determinas la keltojn kiel realan identecon en la proceso de la konstruado de Eŭropo.

## Konkludoj

La keltoj estas parto de nia kulturo, ili partoprenas en la okcidenta mensa bildaro kaj oni ofte povas rigardi tion en la literaturo, kinofilmoj, rakontoj. Ili estas gravaj por helpi nin kompreni eŭropajn devenojn. Ni povas vidi iliajn markojn kaj signojn en diversaj eŭropaj landoj kaj multaj eŭropanoj havas keltajn nomojn. Keltoj kaj kelteco donas al Eŭropo, pere de multaj mirindaj fabeloj, "regnon" de riĉa fantazio.

Do, kial oni ne studas la keltojn paralele kun grekaj kaj romianaj studoj?

Kial oni oferas al la keltoj, en niaj libroj, nur etan spacon kaj nur rapidan superrigardon?

Kial dum kelkaj momentoj oni agnoskas la keltecon, kaj dum aliaj neas ĝin? Se *Vercingetorix*, *Budiko* kaj Sankta Patriko estas tiom gravaj, kial ili ne aperas en niaj lernolibroj?

Kial nur parton de la eŭropa historio oni instruas kaj alian parton oni kaŝas? Ĉu tio estus eble danĝera afero, ekz. al Unuiĝinta Reĝolando kaj al la angla influo kaj regado?



Tiuj ĉi problemoj estas nunaj se oni pensas pri Eŭropa Unio kun 27 landoj kaj 23 oficialaj lingvoj. Kelkaj demandoj pli kaj pli necesas: ĉu Eŭropo havas similan historion, kulturon kaj identecon? Kio kunligas Germanujon kun Skotlando, Francujon kun Pollando, Belgujon kun Portugalujo?

Ĉu ne alia eŭropa historio eblas?

Kiel verki ĝin?

## Literaturo

*Cahill Thomas*: Como os irlandeses salvaram a civilização. Rio de Janeiro: Objetiva, 1999.

*Donnard Ana*: Celtas, Célticos e a Celticidade - embates de uma cultura anônima. História e-História, Campinas, v. 3, p.-18, 2006.

*Green Miranda J.*: *The Celtic World.* London: Routledge, 1996.

*Jacobs Joseph*: Contos de fadas Celtas. São Paulo: Landy, 2003.

*Jacobs Joseph*: Mais Contos de fadas Celtas. São Paulo: Landy, 2002.

*Kruta Venceslas*: *Os Celtas*. São Paulo: Martins Fontes,1989.

*Le Roux Françoise, Guyonvarc H, Christian-J*: *A civilização Celta.* Lisboa: Europa-América, 1999.

*Oliveira Waldir Freitas*: *Os primeiros tempos medievais, os reinos germanos.* Salvador: Centro Editorial e Didático da UFBA, 1988.

*Olivieri F.*: La guerra entre os celtas: da arrogância ao estupor.. In: XXIII, Simpósio Nacional de História - História: Guerra e Paz., 2006, Londrina. Anais do XXIII Simpósio Nacional de História, 2005. p. 1-9.

*Powell T.G.E.*: *Os Celtas*. Lisboa: Verbo, 1965.

*Treguer Michel*: *Revolucionário olhar sobre a expansão. História Viva. São Paulo*, 1 (7): 40-43, 2004.

## Adreso de la aŭtoro

*Dominique* VIEIRA
*Rua H-96 Quadra 167*
*Lote 18B Conjunto Cidade Vera Cruz.*
*Aparecida de Goiânia. Goiás. Brasil.*
Cep: 74936490 BRAZILO
<srodomeniko@yahoo.com.br>

## Priaŭtora informo

Historiisto. Doktoriĝanta studento. Fakstudo: Antikva Historio de Irlando ĉe Federacia Universitato de Gojaso / Brazilo